

První veřejná esperantská přednáška v paláci Svazu národů, nynějšího sídla Spojených národů v Ženevě, Ralph Harry, gen. konsul Austrálie, stálý zástupce Spojených národů v evropské úřadovně v Ženevě a delegát Universala Esperanto Asocio dal předvésti před pozvanými hosty barevný zvukový esperantský film Austrálie dneška v paláci Spojených národů v Ženevě. Mezi řečníky byli ředitel úřadovny Spojených národů M. Pelt, gen. konsul Austrálie Ralph Harry, univ. prof. Dr. E. Privat, Hans Jakob a j.

V Australii je zákon, že každý časopis, vycházející v cizím jazyku musí býti nejméně z 1/4 v angličtině. Toto ustanovení bylo nyní, ohledně esperanta, zrušeno, esperanto není více považováno v Australii za cizí jazyk a esp. časopisy v Australii budou vycházeti bez povinného anlického textu.

Min. předseda Holandska Dr. W. Drees přijal záštitu nad 39. svět. sjezdem esperantistů v Harlemu. Dr. W. Drees je činným esperantistou, což již vícekrát se projevilo za jeho víceletého úřadu min. předsedy.

Holandské ministerstvo pro zahraničí připravuje esperantský film Země a lid.

Ke konci ledna činil počet přihlášených na 39. světový sjezd esperantistů v Harlemu 1400 ze 24 zemí.

Do konce roku 1951 vyšlo 29.050 publikací v esperantu.

Sklizeň 38. svět., sjezdu esperantistů v Zagrebu: v celé zemi jsou pořádány velmi četné esp. kursy, též na školách, v továrnách, podnicích, často se 100 - 150 účastníky. Rovněž vydavatelská činnost v esp. vzrostla v nebývalé míře. Pravidelné esp. vysílání je ze Zagrebu a Osijoku.

Jubilejní sjezd rakouských esperantistů bude se konati ve dnech 5.-8. června ve Vídni.

Čestnou záštitu nad sjezdem osobně převzal rakouský spolkový president Dr. Th. Körner. V čestném výboru je min. zahraničí Dr. Figl, min. pro obchod Udo Illig, min. dopravy Ing. Waldbrunn, dále zemští prezidenti a řada významných osobností. Na pořadu je mimo jiné návštěva Mezinárodního esp. musea v části býv. císařského hradu, kde v 5 velkých sálech budou se konati různé odborné schůze. Slavnostní zahájení bude v Zemské sněmovně, dále bude umělecký večer, přátelský večer, výlet, esp. bohoslužby s esp. kázáním a j.

Děkujeme všem, kteří poukázali příspěvek na letošní rok. Těm, kteří tak dosud neučinili a nezaplatili, přikládáme složenku. Kdo nemůže zaplatiti Kčs 14,-, pro rodinné příslušníky Kčs 6,-, nechť poukáže aspoň registrační příspěvek Kčs 5,- Vaš příspěvek a účast v esp. hnutí je investicí pro mír a mezinárodní dorozumění.

Vk.

Propraj nomoj en Esperanto

Proprajn nomojn en Esperanto ni povas klasi en du kategoriojn: en nomojn asimilitajn kaj nomojn neasimilitajn.

En la unuan grupon apartenas la plej internacie uzataj kaj ĝenerale konataj geografiaj nomoj **1)** nomoj de kontinentoj, gravaj insuloj kaj maroj: Afriko, Ameriko, Azio, Eŭropo, Oceanio, Aŭstralio, Korsiko, Sardinio, Malto, Kreto, Hebridoj, Antiloj, Kanarioj, Madagaskaro, Cejlono, Borneo, Javo, Nov-Zelendo ktp; Atlantiko, Pacifiko, Hinda Oceano, Mediteraneo, Maro Nigra, Maro Ruĝa ktp. **2)** Ĉiuj landnomoj, ekz. Polujo, Hungario, Svislando, Kostariko, Brazilo, Tirolo ktp, **3)** Multaj nomoj de lagoj, riveroj kaj montoj: Ĝeneva Lago, Lago Maĵora, Lago de Gardo, Danubo, Rejno, Volgo, Vistulo, Dnepro, Amuro, Nilo, Jeniseo, Misisipo, Amazono ktp; Monto Blanka, Kaŭkazo, Himalajo, Apeninoj, Alpoj, Altaj Tatroj ktp, **4)** Nomoj de urboj, precipe plej gravaj (ĉefurboj) aŭ rimarkindaj el Esp-a vidpunkto (urboj de UK ktp): Antverpeno, Barcelono, Berno, Bjalistoko, Budapeŝto, Bulonjo, Dancigo, Dresdeno, Edinburgo, Ĝenevo, Hago, Helsinko, Jokohamo, Krakovo, Londono, Kembriĝo, Lisbono, Madrido, Novjorko, Nurnbergo, Moskvo, Munkeno, Oksfordo, Parizo, Prago, Romo, Stokholmo, Varsovio, Vaŝingtono, Vieno, Venecio ktp. Tamen la plejmulto el la subgrupoj 3) kaj 4) restas neasimilita: Mácha Lago, Lac de Neuchâtel, Bodensee, Beĉva, Váh, Ems-rivero, Somme, Appenzell-montoj, Příbor, Liberec, Lille, Lodz, Weimar, Dover, Miskolc, Exeter ktp.

El la personaj nomoj restas ordinare asimilitaj **1)** la antaŭnomoj (baptonomoj): Jakobo, Paŭlo, Alberto, Francisko, Jozefo, Ludoviko, Valentino, Georgo, Johano, Petro, Klaŭdo, Mateo, Luko ktp. **2)** La plej famaj propraj nomoj latinaj, helenaj, hebreaj kaj orientlingvaj: Cicerono, Horaco, Virgilo, Odiseo, Prometeo, Aristotelo, Aĥilo, Homero, Periklo, Sokrato, Eŭripido, Platono, Konfucio ktp.

La Virinaj nomoj estis komence principe same traktataj kiel la viraj (Ifigenio, Ofelio, Heleno, Lukrecio, Mario, Anno), aŭ formitaj el la viraj antaŭnomoj per la sufikso -ino: Paŭlino, Juliino, Ludovikino, Johanino ktp. Sed por distingi virinajn nomojn disde la viraj (ekz. Lucretius disde Lucretia, Julius disde Julia, Mario aŭ Marius disde Maria) oni komencis jam antaŭ jardekoj uzadi la finaĵon -a por virinaj nomoj: Lukrecio (viro), Lukrecia (virino), Julio - Julia, Mario - Maria. Kaj tiel analogie enkondukiĝis la tre internaciaj kaj plaĉaj formoj pluaj: Anna, Eva, Aŭgusta, Paŭla, Antonia, Agata, Barbara, Emma, Berta, Emilia, Eŭgenia, Flora, Greta, Franciska, Gabriela, Georga, Henrieta, Irena, Ludovika, Maria, Marta, Suzana, Viola, Vera, Ida ktp.

En la dua grupo troviĝas la propraj nomoj neasimilitaj. Krom la jam menciitaj neasimilitaj geografiaj nomoj (Budějovice, Grinzing, Inn, Fuĵijama ktp.) tio estas nomoj personaj. Tiuj estas aŭ duonasimilitaj, se oni transkribas ilin el lingvoj, kiuj ne uzas latinan alfabeton, laŭ Esperanta fonetiko, sed sen finaĵoj: Jahveh, Noemi, Zeus, Titus-Livius, Aristippos, Puŝkin, Ĉajkovskij, Tolstoj, Niŝimura, Maŭ Ze-tung, Raĥel, Ruth, Judit. Aŭ ili estas neasimilitaj kaj konservas sian nacian formon kaj alfabeton: Byron, Shakespeare, Gothe, Rabelais, Alighieri, Masaryk, Dvořák ktp. En ĉi lasta kazo oni rekomendas aldoni interkrampe aŭ piednote la proksimuman Esperanta prononcon.

Ĉe asimilado de geografiaj nomoj, landnomoj, urbonomoj gravas vidpunkto de internacieco, neniam vidpunkto iel nacie ŝovinisma! Tial ne sukcesis finnaj esperantistoj trudi al Esperanto formon Suomio anstataŭ Finnlando, kiu estas ja pli multe pli internacia ol la finnlingva nomo Suomi. Same japanoj ne sukcesis por sia lando enkonduki la japanlingvan nomon Nipon (Niponujo). Kaj same fiaskus ia „Dojĉlando“ k.s. Tial malprave indignas iuj el ni (precipe iuj slovakoj) pro la vorto „Bohemio“, proponante „Ĉeĥio“. Ĉeĥio aŭ Ĉeĥujo estas ja komuna nomo por la tuta teritorio loĝata de ĉeĥoj, do por Bohemio, Moravio kaj Silezio. „Bohemio“ estas plene internacia, la radiko aperas preskaŭ en ĉiuj lingvoj: latina, franca, angla, germana, hispana k.a. Same 100% internacia estas la vorto Prago, kiu al iuj erare misrememorigas la malbenatajn tempojn de hitleranoj. La radiko Prag' estas praslava, ĝi hejmas en lingvoj rusa, pola kaj en ĉiuj ceteraj kulturlingvoj (latina, angla, franca, germana, hispana, itala ktp.). Pro sia graveco nia ĉefurbo meritas asimilitan Esperantan nomon. Multe pli belsonaj kaj oportunaj estas ĉiuj derivaĵoj: praganoj, praga ŝinko, Praga dialekto, prageca konduto, veturi Pragon (ol prahaanoj, Prahaa, Prahan ktp.). Do same kiel vi povas uzadi senĝene Paris (ĉiam la koncernan **nacian** formon!) apud Parizo, sentime uzu paralele kaj Praha kaj Prago.

Jiří Kořínek

Atentu! Teatraĵon de F.X.Svoboda "L a l a s t a v i r o" prezentos nia junularo la 27an de aprilo. Ne preterlasu tiun ĉi eventon !
